Esperanto-klubo de Helsinki
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki
http://esperantohelsinki.wordpress.com

Cirkulero 2/2010

**Jarkunvenaj novaĵoj**

La jarkunveno de Esperanto-klubo de Helsinki okazis 9.3. La kunveno faris jenajn decidojn. Estis elektita nova estraro: Sakari Kauppinen, prezidanto, Taneli Huuskonen, Jukka Pietiläinen, Päivi Saarinen kaj Ritva Sabelli estraranoj, Kristiina Hautamäki kaj Salla Lappalainen vicestraranoj. La posta estrara kunsido elektis Jukka Pietiläinen vicprezidanto kaj kasisto, Ritva Sabelli sekretario. Membrokotizo por 2010 estas 20 eŭroj, rabatita kotizo 10 eŭroj de familianoj de plenpagantaj membroj kaj junuloj maksimume 30-jaraĝaj. Paginformoj venas kun tiu ĉi cirkulero, bonvolu pagi vian kotizon kiel eble plej baldaŭ. Same kiel ĝis nun, la klubo abonos al ĉiu membro (krom familianoj) la revuon Esperantolehti. Por ricevi la revuon, pagu la kotizon ĝis la 15a de majo.

**Kubo, neeblaj mondoj kaj rododendroj**

Tiuj estas kelkaj el la ingrediencoj en nia printempa programo. En aprilo ni konatiĝos kun la gastiganta lando de la 95a Universala Kongreso. La kunveno okazos ĉe Ritva, Pietarinkatu 10 D 27 ĵaŭdon, la 22an de aprilo ekde la 18a horo. Prefere konfirmu vian alvenon anticipe per retpoŝto al ritva.sabelli@pp.inet.fi.

En majo, 15.5. ni vizitos la Artmuzeon de Amos Anderson kaj konatiĝos kun la ekspozicio "neeblaj mondoj" de M. C. Escher. Renkontiĝo ĉe la biletvendejo je la 14a horo, adreso Yrjönkatu 27.

En junio ni vizitos unu el la interesaj parkoj de nia urbo. Sabaton 5.6. ni faros someran ekskurson al la Rododendra parko, kiu situas en Haaga. Ni kolektiĝos en la fervoja stacio je la 12a horo kaj veturos kune ĝis la stacio Huopalahti. Vi povas veni ankaŭ rekte al la parko, kiu situas en la fino de Laajasuontie, kontraŭe al la vojkruciĝo kun Paatsamatie. Ankoraŭ ne eblas diri la tempon de la plej bona florado, sed en nia ekskurso vi konatiĝos oportune kun tiu unika parko.

**Novaĵoj de nia retejo**

Nia retejo funkcias ĉe adreso http://esperantohelsinki.wordpress.com. Se vi ne jam vizitis ĝin, bv. konatiĝi kun ĝi, ĉar tie estas ĉiam la plej freŝaj informoj pri nia agado. Tie troviĝas ekzemple jenaj lastatempaj afiŝoj:

**Esperantoa luostariympäristössä**
Ensi kesänä on jo yhdestoista tilaisuus opiskella esperantoa Valamon kansanopistossa. Tämän vuoden kurssiviikon ajankohta on 27.6.-2.7.2010.

**Blovas vento el Varsovio kaj aliaj interretaj radiostacioj**
Ĉiuj el vi certe konas la esperantajn programojn de Pola Radio, sed ĉu vi scias, ke ekzistas ankaŭ alia pola radiostacio emisianta en Esperanto? Temas pri interreta Varsovia Vento.

**Artistoj invitas al provaŭskultado**
Multaj esperantaj kantistoj alŝutis siajn verkojn al interreto kun la celo oferti al la publiko specimenojn de sia repertuaro. Konatiĝu ekzemple kun Alejandro Cossavella aŭ iom pli poste kun la grupo Kaj Tiel Plu.

Tiu ĉi cirkulero kun pagilo estas sendata al ĉiuj membroj. Se vi volas ŝpari al ni monon, vi povas informi nian adresar-prizorganton Taneli Huuskonen <taneli@poczta.onet.pl>, ke vi ne plu volas paperan cirkuleron. Tiam ni ne multobligos ĝin por vi nek sendos poŝte. La cirkulerojn vi povas legi en nia retejo. Notu, ke vi povas ankaŭ aboni la retejon kaj ricevi mesaĝon ĉiufoje kiam aperas nova afiŝo.

Saajan tilinumero Nordea 101130-229178

**TILISIIRTO**

| | |
|---|---|
| Jäsenmaksu 2010 | 20,00 € |
| Perheenjäsen | 10,00 € |
| Nuori max. 30 v. | 10,00 € |

Saaja Helsingin Esperantoseura
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki

Maksaja

Allekirjoitus________________________________________ Viitenro 107

Tililtä n:o

Eräpäivä

Euro

Saajan tilinumero Nordea 101130-229178

**TILISIIRTO**

| | |
|---|---|
| Jäsenmaksu 2010 | 20,00 € |
| Perheenjäsen | 10,00 € |
| Nuori max. 30 v. | 10,00 € |

Saaja Helsingin Esperantoseura
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki

Maksaja

Allekirjoitus________________________________________ Viitenro 107

Tililtä n:o

Eräpäivä

Euro